La kuba prezidento partoprenas virtualan kunsidon de UN

Miguel Díaz-Canel Bermúdez, prezidento de la kuba respubliko

Havano, dec 3 (RHK) La kuba prezidento, Miguel Díaz-Canel partoprenas hodia? la XXXI-an eksterordinaran periodon de sesioj de la ?enerala Asembleo de UN (UN) nun okazanta virtuale.

La renkonti?o da?ros du tagojn kaj analizos la tutgloban respondon al la pandemio de la Covid-19.

La reprezentantoj de Kubo estos, krome, la ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez, la konstanta reprezentanto de Kubo en UN, Pedro Luis Pedroso, kaj aliaj funkciuloj de la ministerio.

La kuba ?tatestro partoprenis pasintseptembre en la ?enerala debato de la 75-a periodo de sesioj de la ?enerala Asembleo kunvokita anka? virtuale, kie li denuncis la eskaladon de agresoj de la usona registaro kontra? la kariba insulo meze de la Covid-19.

La agresemo de Va?ingtono eskalis je nivelo kvalite nova, kiu fortigas sian kondi?on de reala kaj influa obstaklo por mastrumi la ekonomion kaj evoluon, li denuncis.

Same, li petis ?esi la misfamigan kampanjon kontra? la internacia kuracista kunlaboro de Kubo, kies membroj kontribuas al la vivosavado kaj redukti la sekvojn de la pandemio en diversaj latitudoj.

Fonto: Prensa Latina

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/241389-la-kuba-prezidento-partoprenas-virtualan-kunsidon-de-un

Radio Habana Cuba